

Bosnia Lilio

**GAZETO DE ESPERANTO-LIGO
DE BOSNIO KAJ
HERCEGOVINO M50 1/1997**

**KATALUNA
ESPERANTISTO**



LA PONTOJ DE AMIKECO

Gazeto de Esperanto-
Ligo de Bosnio kaj
Hercegovino, n-ro
1/1997, jarkolekto 1,
1997.

Solidara eldono de
Kataluna Esperanto-
Asocio.

Redakta stabo:

Mustafa Resulović,
Senad Čolić, Šefik
Rizvanović, Azra Čolić
(ELBH).

Felip Artero, Pere
Bernús, Eric Collignon,
Xavier Múrcia, Marina
Ollé, Llibert Puig,
Xavier Romero (KEA).

Fotoj: "Oslobodjenje",
Sarajevo.

Subtena abonprezo:

10 NLG, 1000 Ptoj

Enlandanoj:

Caixa d'Estalvis i
Pensions de Barcelona -
agència 461 Sabadell.
Kontonumero: 2100
0461 90 0200055053

Eksterlandanoj:

Pago al la konto de KEA
en UEA: kaea-b

La bosnia proverbo diras: kiu
rapide helpas, duoble helpas! Tio
plej bone konfirmiĝis en la
malfacilega situacio en kiu sin
trovis Bosnio post brutalega agreso
fare de Serbio en 1992.

Unu el la unuaj celoj de la agresinto
estis realigi totalan informan
blokadon detruante ĉiujn
komunikilojn por malebligi vojon
al la vero pri ĉio efektive okazanta
en Bosnio. Tial unu el la ĉefaj taskoj
de ĉiuj patriotaj fortoj en Bosnio
estis rompi la informan blokadon.
Al tiu tutpopola agado aktive aliĝis
ankaŭ la E-Ligo de Bosnio-
Hercegovino, kiu dum la unua pe-
riodo de la agreso mem suferis
gravajn perdojn de homoj kaj
havaĵoj.

Milita estraro de ELBH unue
intencis kaj planis eldoni presitan
informilon en la Internacia Lingvo.
Pretigi la unuaj materialoj, la
gazeto ricevis nomom "Bosnia
Lilio". Sed en teruraj kondiĉoj de
totala blokado kaj detruado
malfacile imageblaj, ni konstatis ke
ege malfacile estus tute sukcese
realigi la planon. En sarajevaj
vivkondiĉoj ni decidis rezigni kaj
provi serĉi alian solvon.

Aperis baldaŭ la ideo lanĉi radio-
elsendon en Esperanto.

La 4-an de agusto 1994 en nokto
inter merkredo kaj Ĵaŭdo je
ondolongoj de radio-Sarajevo nia
parolistino Azra Čolić anoncis
komencan de "Esperanto el
Sarajevo". La elsendo rapide
renkontis favoran akcepton ĉe
aŭskultantaro. Tre baldaŭ reagis
aŭskultantoj el Italio, Hispanio,
Francio, Kroatio, Germanio kaj
aliaj landoj.

Katalunaj esperantistoj estis ankaŭ
inter la unuaj kiuj proponis helpon.
En nia programo ni raportis pri

altnivela pribosnia agado de
eminenta kataluno Jose Maria
Mendiluce, kiu inter la unuaj
diplomatoj atestis pri sangaj krimoj
de serbaj agresintoj kontraŭ la
bosna loĝantaro en urbo Zvornik ĉe
rivero Drina en orienta Bosnio.

Katalunaj esperantistoj invitis
bosniajn esperantistojn viziti ilian
belan landon. Prezidanto de ELBH
Senad Čolić gastprelegis komence
de 1996 kaj tiam interkonsentis pri
pluraj formoj de reciproka
kunlaboro.

"Esperanto el Sarajevo" estis en
programo de Radio-sarajevo dum
17 monatoj. Ni elsendis 73
programojn kun kontribuaĵoj de
plurdeko da elstaraj aŭtoroj,
kelkcent novaĵojn el Bosnio,
plurajn mesaĝojn de la aŭskultantoj
kaj al la aŭskultantoj. Sed
bedaŭrinde de la 1-a de januaro
1996 Radio-sarajevo ĉesis elsendi
en Esperanto (n.d.l.r.: vi vidu en la
rubriko "novaĵoj el Bosnio" ke
"Esperanto el Sarajevo" nun
denove aŭskulteblas).

Post ĉesigo de la elsendo, kiun ni
preparis kaj realigis en ege
malfacila, heroeca periodo, denove
aperis la demando: kion nun?.

Sed denove aperis katalunaj
geamikoj. Reviviĝis la ideo pri
eldonado de presita informilo kiu
aperus en Katalunio. Jen la ideo
realiĝis. Antaŭ vi estas, karaj
gelegantoj, "Bosnia lilio". Ni
atendas vian apogon kaj
partoprenon en la konstruado de
novaj pontoj de amikeco kaj
kunlaboro. La E-movado en
Bosnio-Hercegovino dum 85 jaroj
de organizita agado ĉiam havis
larĝe malfermitan pordon por ĉiuj
bonvolemaj homoj senkonsidere
nacion aŭ alian apartenon. Feliĉon!

Mustafa Resulović

ENKONDUKO

Post la terura milito kiu frapis Bosnion, KEA, kiel multaj aliaj organizoj de nia lando, proponis kooperan agadon al bosna asocio, nome al ELBH. Tial, kiel ni klarigis en nia revuo "Kataluna Esperantisto", kunlaborprogramo inter la du asocioj elstarigis dum somero 1996. Tiu "Projekto de Kunlaboro por la Rekonstruo de la Asocia Reto de Bosnio kaj Hercegovino" enhavis plurajn aspektojn: vizito de bosniaj infanoj al Katalunio, eldonado de la libro "Spite al ĉio" (selekto de la esperantlingvaj elsendoj de Radio Sarajevo), proviziado de oficeja materialo por ELBH kaj ... eldonado de la revuo "Bosnia Lilio".

Post iom longa atendo, kies kialoj estus tro longe klarigi tie, jen ĝi! Vi havas en viaj manoj la unuan ekzempleron de "Bosnia Lilio" kiun ni estas fieraj solidare eldoni por niaj bosniaj geamikoj.

Tra tiuj paĝoj vi informigos pri detaloj de la kooperado inter niaj du asocioj, pri renaskiĝo de la Esperantomovado en Bosnio kaj pri bazaj aspektoj (ekonomiaj, historiaj...k.t.p.) de tiu lando.

Ĝuu la legadon kaj, se tiu revuo plaĉas al vi, partoprenu ĝian vivtenadon dank'al via abono.

Antaŭen Bosnio!

BOSNIO KAJ NI (KAT. E-ISTO 12.96)

Nia projekto de kunlaboro kun Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino (ELBiH) por la restarigo de la tiea E-movado, disvolviĝas preskaŭ laŭ antaŭvidita ritmo, kaj ni ĝojas informi niajn membrojn pri tio.

La projekto konsistas el 4 eroj kiel informite kaj ni sukcese plenumis tiun de la venigo kaj gastigado ĉe ni de 15 bosniaj infanoj, kiuj kun sia gvidantino Azra Ĉolić, ekonomikistino kaj elstara aktivulino de ELBiH, restis ĉe ni 3 semajnojn, inter la 7a kaj la 28a de julio.

La gastigadon de la infanoj prizorgis Centro de Esperanto Sabadell (CES) kaj en tiu urbo gastis la plejparto de ili, cetere 3 gastis en Polinyà kaj po 1 en Barberà kaj St. Quirze del Vallès.

Je alvoko de CES tra la lokaj ĵurnaloj, sin proponis pluraj familioj, inter ili kelkaj esperantistaj, pretaj gastigi infanojn, kiuj kunvenis plurfoje kaj inter ili formiĝis organiza komisiono laŭcele pretigi taŭgan agadprogramon. Oni celis ne laborigi la infanojn sed distri ilin kaj tiel oni pretigis interesan programon.

CES proponis rapidan dumonatan E-kurson al la gastigantaj familioj laŭcele faciligi la interkomunikadon kun la bosniaj infanoj kiuj ankaŭ lernis Esperanton en Sarajevo. Tamen ĉar ne ĉiuj familioj partoprenis, la rezulto ne estis centprocente efektiva, sed tiuj kiuj lernis la lingvon eĉ dum mallonga tempo, sufiĉe interkompreniĝis laŭ la akirita nivelo.

La alveno de la bosna karavano estis antaŭvidita dimanĉon 7an de julio je la 21,30 h. vespere, sed pro sinsekvaj elirprokrastoj en Ljubljana, ili alvenis lunde je la 3a h. frumatene, tamen kaj la organizantoj kaj ĉiuj familioj pacience atendis en la flughaveno kun forta emocio kaj kun granda bonveniga 5-metrojn longa afiŝo kun jena teksto: BONVENAJ EN KATALUNIO kaj en Esperanto kaj en bosna lingvo.

La infanojn gvidis kaj prizorgis dum ilia restado, la bosna gvidantino Azra Ĉolić kaj niaj katalunaj aktivuloj Pere Bernús kaj Arnau Torras.

Nia iniciato vekis grandan publikan intereson kiel pruvas la fakto ke la loka gazetaro kaj du katalunaj televidoj informis pri ĝi kaj cetere kiel konsekvenco CES altiris duoblan pli grandan lernantaron al siaj ĵus komencitaj kursoj.



PROGRAMO DE LA SOMERFERIADO DE BOSNAJ INFANOJ EN KATALUNIO

■ Tuttagaj ekskursoj okazis ĉiusemajne: dum la unua ili vizitis en Barcelono la Barça-n stadionon kaj muzeon kaj la glaci-palacon dummatene kaj “Aquarium” posttagmeze; dum la dua ili vizitis Palamós-plaĝon dummatene kaj Girona-urbon posttagmeze kaj dum la tria ili vizitis *Port Aventura* (tiu lasta vizito sub la aŭspicio de la komerca entrepreno “Congelats la Sirena”).

■ Tuttagan sportumadon ili praktikis en sporta paviliono de St.Quirze del Vallès.

■ Dufoje ĉiusemajne ili sin banis en sabadella municipa naĝejo tre konata, “La Bassa”, dummatene kaj posttagmeze ili ekzercis kanzonan repertuaron bosnan, katalunan kaj esperantan, kiun ili prezentis en koncerto dum adiaŭa festo lastsemajna.


■ Kulturaj vizitoj okazis al la Paleontologia Muzeo kaj al la Astronomia Observatorio.

■ Oficialaj akceptoj okazis en la Urbodomoj de Sabadell, Sta. Perpètua de la Mogoda kaj Polinyà (vidu la sabadellan

akcepton kun la tiea urbestro), kiuj cetere plejparte subvenciis la tutan 1.500.000-pesetan buĝeton de la programo.

■ Adiaŭa festo ĉe urbocentra placo sabadella okazis lastan jaŭdon kaj tie niaj bosnaj kaj katalunaj infanoj kantadis kaj ankaŭ tion aparte faris la saharaj infanoj, samtempe gastigitaj en la urbo.

■ Adiaŭa kaj danka vespermanĝo okazis lastan vendredon inter la infanoj kaj la gastigitantaj familioj kun projekcio de videofilmo pri Sarajevo.



STA PERPETUA -TEŠANJ

MODELA KOOPERA HELPO

Kiam mi decidis intervui Sebastia Ribes, aktiva membro de nia centro kaj sekretario de la urbestro de Sta Perpètua, mi tute ne suspektis ke mi malkovros tion kio ŝajnas al mi unu el la plej fekundaj kaj riĉenhavaj kooperaj agadoj inter Bosnio kaj Katalunio (almenaŭ laŭ esperanta vidpunkto).

Jen resumo de nia renkontiĝo kaj de tiu originala ago.

Sebastia ricevas min surterase je la malantaŭa parto de la domo, paca kaj freŝa loko kiu tre agrablas dum tiu iom tro frua somero. Post oferti al mi malvarman trinkaĵon, li tuj komencas paroli pri lia nuna pasio, Bosnio.

Unuan kontakton kun tiu lando li havis partoprenante la I.J.K. de 1972 en Sarajevo kun kelkaj esperantistoj de la Centro de Sabadell. Tiuepoke, oni parolis nek pri bosna junulara esperanta asocio, nek pri kataluna. Ambaŭ regionoj estis submetitaj de sia respektiva maldekstra kaj dekstra diktatoro. Por la juna Sebastia tia vojaĝo reprezentis eksterordinaran eblecon provizi sin je tio kio tute malhaveblis en Katalunio kaj kontraŭe kaj logike tute nemalhaveblas por li. Li memoras ridete kaj amuze ke unu el la plej ŝatataj kaj serĉataj libroj estis la "ruĝeta libro" de Mao. Mirinde tiu diabla verko, laŭ hispanaj kriterioj, aĉetebis senlime kaj en esperanta versio kune kun ĉiuj imageblaj marksistaj verkoj kaj la populara en la esperantaj medioj "El Popola Ĉinio" same rigore malpermesitaj en Franko-lando. La vojaĝo jam estis pravigita nur pro tiaj aĉetoj.

Tiama Jugoslavio tre protektis lingvajn rajtojn de ĉiuj siaj

membroj kaj komunumoj. Oficiala situacio de Esperanto same estis ege favora. La internacia lingvo estis ekzemple elektebla kiel opcia lingvo en la gimnazioj. Spite al tiu ĝenerala pozitiva situacio, jam estis plendoj de la kroataj kaj muzulmanaj esperantistoj kontraŭ troa kontrolo de la serboj ene de la esperantaj jugoslavaj institucioj (ĉefe la Jugoslava Ligo). Tio sendube memorigas ion al la junaj katalunoj.

1992-1995, kvar militaj jaroj en Bosnio kiuj emociis Eŭropon, eĉ se tio ne tradukiĝis en arma interveno nek en arma helpo. Katalunio amase reagis humanece sendante helpajn konvojojn, kreante Ambasadon de Loka Demokratio...Katalunaj urboj ekteksis helpajn rilatojn kun bosnaj urboj.

Interŝanĝo inter Santa Perpètua kaj Teŝanj konkretiĝis kiam bosna ambasadoro en Hispanio prelegis en Sabadell pri pacakordoj de Dayton januare de 1996.

Tiuepoke la kataluna urbeto estis serĉanta kooperajn projektojn por dediĉi parton de sia buĝeto (okazis tiam en tuta Hispanio kampanjo favore al atribuo de 0,7 procento de ĉiu publika buĝeto al la kooperado). Sebastia, urbestra sekretario ĉeestante tiun prelegon kun la urbestro de Santa Perpètua aŭdis kiel la preleganto pledis por diverseco de la helpo tro centrigita en Sarajevo. La reprezentantoj de Santa Perpètua tuj reagis petante ĉu eblis helpi bosnan urbon kun similaj karakteroj al la sia. Respondo logike estis jesa kaj proponita urbo estis Teŝanj.

Komenciĝis tiam unuaj kontaktoj inter la du urboj pere de nia Centro

en Sabadell kaj de la bosnaj esperantistoj el Sarajevo, ĉefe de Senad Ĉolić de la Esperanta Ligo de Bosnio kaj Hercegovino.

Fine de 1996, unua esplora tritaga vizito de reprezentantoj de Santa Perpètua estis decidata unuanime (ambaŭ kaj urba registaro kaj opozicio akceptis kaj estis reprezentataj en la urba delegacio)

Tre originala estas la fakto ke, kontraŭe al la aliaj katalunaj urboj kiuj iras surloke kunprenante sian interpretiston kaj kiuj uzas la anglan kiel pontan lingvon, la delegacio de Santa Perpètua decidis lui servojn de sarajeva esperantisto kiu akompanis ilin en Teŝanj. Esperanto fariĝis tiel punta lingvo inter katalunoj kaj bosnoj kaj tiu decido rezultigis tre profitdona kiam konstatigis ke tre malfacilis trovi fluan anglan parolanton en Teŝanj.

Surprize, la unuaj kontaktoj kun Teŝanjanoj ne tro varmis. La loĝantoj de tiu bosna urbo fakte jam vidis multajn solidarajn asociojn trapasi la urbeton kaj proponi kelkajn projektojn al ili sen neniam konkretigi ilin. Ili tial iom malfidis vanajn promesojn. Krome ĉio aspektis iom stranga en tiu kataluna delegacio. Kie estas Santa Perpètua kaj kiu estis tiu kurioza lingvo kiun ili uzis dum la tradukado?

Spite al tiu hezitemo, ili montris la vilaĝon al la Katalunoj, la promilitajn detruojn kaj la promilitajn rekonstruojn (tuja rekonstruo estis por ili efika rezistema sistemo), ĉefe la fabrikan de veturilaj akcesorajoj de kiu la tuta vilaĝo ekonomie dependas.

Post insisto de Sebastia kiu miris pro la urba bonaspekto, ili ankaŭ montris la ruinaĵojn provokitajn de la serba bombado.

La etoso pli kaj pli boniĝis inter la du delegacioj kaj la Bosnoj fine proponis tri helpajn projektojn al la Katalunoj.

Inter la projektoj rekonstrui la bibliotekon, la sportan pavilonon aŭ la hospitalon, la urbodomo de Santa Perpètua elektis tiun lastan. Hospitala stato estis fakte tre mizera. Ĝia tegmento parte jam malaperis de longtempe; akvo penetris en ĉiujn murojn kaj teruraj malsekeco kaj ŝimo videblis ĉie. Pro tagmenta manko, neĝo ankaŭ eniĝis en la supran parton. Spite al ĉio-ĉi, la hospitalo daŭre devis funkcii.

Santa Perpètua-urbodomo disponis pri 10 milionoj da pesetoj ene de la sumo de 0,7 % de la urbodoma buĝeto kaj ili decidis tuj dediĉi tiun kvanton al la tegmenta riparo. Sed, krom tio? Kie trovi la nemalhaveblan financan komplementon?

Revene al Sarajevo post lasta radio-elsendo en Teŝanj kie oni intervjuis ilin (ĉiam pere de Eo) pri la projekto dum 3 horkvaronoj (tiu radio estas kutime aŭskultata de 250.000 personoj), Santa Perpètua-representantoj serĉis alian helpon por la martirigita urbo tra eŭropaj institucioj en Sarajevo.

Kaj tie kaj mirinde ili sukcesis malglaĉiigi helpan projekton por Teŝanj je valoro de 80 milionoj da pesetoj. Programo "Echo" de "Eŭropa Oficejo de Internacia Helpo" jam interesiĝis pri Teŝanja situacio kaj, observante taŭgan seriozecon en la projekto de Santa Perpètua, akceptis atribui la supremenciitan asignon por la hospitala rekonstruo.

Por kompletigi tiun eksterordinaran sukceson, katalanoj sukcesis tra la "Kataluna Fondiso de Kooperado" (tiu organizo administras 0,1 % de la 0,7 % dediĉataj al solidareco por la urbodomoj kiuj tion petas) ricevi komplementan helpon de 12 milionoj da pesetoj. Entute 100 milionoj estos tiel sendataj al Teŝanj por la rekonstruo de la hospitalo.

Se al tiu impresa sukceso, oni aldonas ke novaj projektoj pri interŝanĝo de lernantoj kaj pri formado de ĉiaj laboristoj en la hospitala kampo (gedoktoroj, geflegistoj, geanestezistoj kaj ĉiuj ajn tiukampaj geteknikistoj) komplementis intertempe la iniciatan agon, oni havas pli precizan ideon pri la amplekso de la projekto.

Tiu projekto tre gravas por ni, krom pro ĝia esenca solidara valoro, ĉar ĝi donas kernan rolon al Esperanto. Sebastia klarigas ke oni kompreneble ne povis delegi la povon administri la monon al Teŝanjaj reprezentantoj. Devige oni elektu neŭtralan reprezentanton aŭ asocion.

Tiel Senad Ĉolić fariĝis oficiala reprezentanto de Santa Perpètua rilate al Teŝanjaj aferoj je unanimeco de la urbodomo. Krome, la N.R.O. "La Espero" formata de Esperantistoj el Sarajevo estis ŝargata, tra kontrakto kun Santa Perpètua urbodomo, administri la tutan projekton en Teŝanj.

Jen do la brila rezulto atingita de Santa Perpètua pro iniciato de Sebastia.

■ Konsiderinda sumo atribuita al solidara projekto en Bosnio.

■ Daŭraj kreitaj ligiloj inter du mezgrandaj urboj el Katalunio kaj Bosnio.

■ Fondiĝo de NRO en Bosnio tra kiu lokaj Esperantistoj sukcesis trovi laboron en la disvolviĝa kampo kaj ricevi salajron por kontroli kaj administri la helpajn sumojn (la membroj de "La Espero" enspezas rekompencojn pro la farita laboro)

■ Grava propagando por Esperanto kiu estis kaj daŭre estas la uzata lingvo en la interŝanĝo inter la du urboj.

Oni eĉ povas konsideri ke unu el la plej bonaj manieroj disvastigi nian lingvon estas tra tiaj projektoj kie Esperanto aperas ne kiel celo en si mem sed kiel efika perilo en ambicia tasko.

Laŭ Sebastia, rilatoj inter Katalunoj kaj Bosnoj estas ankaŭ tre favorigataj pro ilia sama sentemo al naciaj kaj minoritataj problemoj. Bosnoj ekzemple tuj rimarkis ke ekzistis dueco de lingvoj en la delegacio de Santa Perpètua kies membroj parolis kastilian kaj katalunan lingvojn kaj ili demandis multajn klarigojn pri tio.

Resume oni nur povas gratuli nian samklubanon pro tiu rimarkinda sukceso kaj atenti pri la sekvaj paŝoj de tiu modela kontribuo al la internacia helpo.

E.C.



Ajuntament de
Santa Perpètua de Mogoda

VIDPUNKTO DE BOSNO EL KATALUNIO

Inter ĉiuj vidpunktoj pri la milito en Bosnio, ŝajnis interese al ni aldoni iun de Bosno vivanta en Katalunio. Miro Haĝi Hasanović vivas en Hispanio de 15 jaroj kaj pli precize en Katalunio (Barcelono) de 5 jaroj. Ni faris al li kelkajn demandojn pri la eventoj de lia devena lando kaj pri Esperanto.

S-ro Miro Haĝi, kiu estas via rilato kun Esperanto kaj kion vi opinias pri ĝi?

Mi estis tre aktiva esperantisto dum mia juneco kaj eĉ ekkonis mian edzinon pere de Esperanto dum iu kongreso. Post nia geedziĝo, ni vivis dum 15 jaroj en Sarajevo kaj poste translokiĝis en Hispanio kie mi vivas kun miaj gefiloj de antaŭ 15 jaroj.

Por mi Esperanto ĉiam estis kaj daŭre estas tre simpla kaj utila ilo por faciligi sendiskriminaciajn rilatojn kaj interkonatiĝon inter personoj el diversaj kulturoj. Esperanton oni ne devas trudi al la aliaj lingvoj nek la uzon de certa ideologio aŭ certa vivstilo. Nur la uzo kaj ĝia interna logiko devas enkonduki al ĝia adopto kiel internacia lingvo por ke ĉiuj povu debati egalrajte.

Vi disigis vian vivon inter Bosnio kaj Katalunio. Kiujn similecojn (kaj malsimilecojn) vi vidas inter ili?

Ambaŭ socioj situigas geografie je iu grava vojkruco de diversaj migrantaj popoloj. Pro tio dum ilia longa historio, tiuj teroj ricevis popolojn de tre malsimilaj devenoj kunportante siajn proprajn kulturojn kaj tradiciojn kiuj enmiksiĝis kun la tiea kulturo. Tio kreis plurkulturajn sociojn kun tre malferma pensmaniero kaj granda kapableco integri diversajn kulturojn.

Se temas pri diferenco, eble mi dirus ke katalunoj, eĉ se ili vivas globale en aperta socio, estas pli individuemaj kaj ke solidareco kun nova enmigranto ne estas tiom forta en Katalunio kiom en Bosnio kie tradicio volas ke oni ofertu al nova alvenanto ĉion bezonatan por ke li sentu sin hejme

Kiu estas via analizo pri la eventoj el Bosnio?

Antaŭ dek jaroj la kunvivema etoso kiu ekzistis inter la diversaj komunumoj kiuj formas la ŝtaton de Bosnio tute ne pripensis okazon de la tragedio kiun vivis la bosna popolo en 1992. Kiel mi diris antaŭe, bosnia socio ĉiam karakteriziĝis pro ĝia malfermeco kaj ĉiuj

popoloj kiuj enmigris en ĝian teritorion estis bone akceptataj kaj konservis siajn kulturojn kaj religiojn (islaman, judan, ortodoksan kaj katolikan) kaj tio estigis reciprokan riĉiĝon de kulturoj.

Post la malapero de reĝimo de Generalo Tito, la radikalaj frakcioj de diversaj komunumoj, pro teritoriaj, partiaj, ekonomiaj interesoj kiuj havis nenian rilaton kun la intereso de la komunumo kiun ili nome reprezentis, kreis kaj altigis la tension inter la etnoj kiuj ĉiam pace kunvivis en la pasinteco.

Kiel vi vidas la estontecon de Bosnio?

Ŝajnas al mi tre malfacile retrovi la paceman kunvivadon kion ni konis antaŭ dek jaroj. Nur paso de la tempo kaj generacia ŝanĝo povos alporti pliboniĝon de la situacio. Nur generacio kiu ne konis la militon povos rekrei novan bosnan komunumon kies diversaj etnoj harmonie kunvivos. Krome devas esti honesta justeco kiu punu ĉiujn okazintajn krimojn dum la konflikto, justeco kiu ne permesu ke punomanko vivtenu malamojn kiuj povus reokazigi novan militon.

Kiu estas via konkludo pri tiuj tragikaj eventoj?

Ni devas esperi ke la ĵus pasinta historio evitu fali en la samajn erarojn en la estonteco.

Pro tio ni devas precipe fidi al profunda analizo kaj ne al la amaskomunikiloj kiel televido kiuj ĉiutage montris bildojn pri la konflikto sed kiuj konvertis tiun tragedion en banalan spektaklon dum la vespermanĝo.

Intervjuo farita de Xavier Romero


La sieĝo de la sieĝoj

Krom diversaj vidpunktoj de la Bosnoj pri Bosnio, plaĉas al ni aldoni en ĉi-tiu revuo tiun de unu el la plej internacia kaj "kulturmestizema" verkisto el Katalunio.

Juan Goytisolo naskiĝis en Barcelono en 1931 sed kutime dividas sian vivon inter Paris kaj Marrakech. Lia tuta verko pledas por pli tolerema mondo kaj li gajnis en 1993 la Nelly Sachs premion kiel "reprezentanto de la literatura moderneco kaj la dialogo inter kulturoj". Flua parolanto de la araba lingvo, li sukcesis antaŭ kelkaj monatoj ke la buntkolora placo de Djemaa El-Fna el Marrakech estu deklarata "parola komuna havaĵo de la Homaro" pro ĝia eksterordinara kvanto da surstrataj artistoj.

"La sieĝon de la sieĝoj" li skribis post restado en Sarajevo dum la plej teruraj momentoj de la sieĝo. Kiel li skribas "la hororo kaj indigno pri ĉio kion mi vidis ankoraŭ vundas min kaj mi devis eskapi min en la fikcion por fuĝi kaj kuraci la bildojn kiuj sieĝis min. Tiel estas la povo de la literaturo".

La libro disvolviĝas ĉirkaŭ malkovro de kadavro en iu Internacia Hotelo de Sarajevo post bombado de la Serboj. Tiu kadavro estas tiu de mistera homo kiu sin prezentis la antaŭan tagon vespere en la hotelo. Lia nomo, Ben Sidi Abū Al Fadaïl, korespondas al tiu de sanktulo de Marrakech vivinte antaŭ pluraj jarcentoj kaj pri kiu la deĵoristo de la hotelo, samtempe historiisto skribis specialan tezon en la ĵusbombita biblioteko de Sarajevo. Kroma koincido estas ke tiu nekonato surhavas poeziojn de la fama antaŭulo.



Anaŭ la graveco de la malkovro, la historiisto helpata de kelkaj bosnaj amikoj decidis malaperigi la kadavron kaj anstataŭi liajn historiajn verkojn per tiuj de alia mistera homo, poezioj kaj verkoj de samseksemulo malliberigita en frenezulejo de Melilla (hispana posedo en Maroko) far la hispanaj naciistoj en 1936. Al tiuj verkoj ili ankaŭ aldonas pli freŝdatajn tekstojn pri la sieĝo kiujn ili mem skribis. Celo de tiu anstataŭiĝo ne nur estas kaŝi la identecon de Ben Sidi Abú Al Fadúl sed ankaŭ frenezigi la hispanan komandanton de U.N. prizorganto de la enketo (sarajevanoj fakte ne tro ŝatis la blukaskulojn). Sed baldaŭ okazas ke la insidantoj ankaŭ estas iamaniere enkaptitaj kaj misteraj rilatoj aperas inter ĉiuj tekstoj.

Tiu libro fariĝas tiel komentoj de tekstoj. Tekstoj kiuj samas, aldonas novajn elementojn unu la aliajn, interplektiĝas ŝed, parolante pri la sieĝo de Sarajevo, de la persekuto de samseksemuloj, de la sefardaj rifuĝintoj en la XVa jarcento en Sarajevo aŭ de la neklarigebla sieĝo de Pariza kvartalo far la polico, ĉiuj havas komunan kernon: strebo kaj lukto por mondo pli aperta kaj tolerema kontraŭ ĉiuj kaj ĉiaj sieĝoj.

Ni tradukas ĉi-sube tekston rilate la sieĝon de Pariza kvartalo:

“Fortikigataj en siaj hejmoj, la loĝantoj de la kvartalo demandis sin kun kreskantaj angoro kaj kulposento kial oni tiel punis ilin. Pri kiu krimo kiu pravigus tian barbaran sturmon ili kulpis? Kial oni tratis ilin kiel senpaperajn nigruojn, integristojn, aidesulojn aŭ drogemuojn?”

“Ili abomenas nin pro nia akceptemo, pro nia paca kunvivado kun la enmigrintoj” diris la frizistino de la dua etaĝo edziniĝinta de 20 jaroj kun arabo.


Je la dompordo de la konstruaĵo kuŝis kribrita korpo de alia Nordafrikano kaj neniu kurachelpanto alkuris por forpreni ĝin kaj doni al ĝi sepultadon. “Kulpo estas ilia” la najbarino sentencis malfacile provante elteni la larmojn per la poŝtuko. Se ili restintus en siaj landoj anstataŭ veni al la nia, ni ne suferintus tion kion ni nun suferas! Vi, amiko mia, perfekte konas mian pensmanieron; mi ne estas rasisma sed la fakto estas tie. Kiuj malfamigis la kvartalon? La eksterlandanoj! Kiu per tranĉilo atakis mian bofratinojn - ŝi ripozu pace - lastan fojon kiam ŝi venis vidi min? Arabo. Kiu enlifte agredis la vidvinon de la sepa etaĝo? Nigrulo. Kiuj vendas kaj injektas sin drogojn en la strato Saint-Denis kaj en la metroaj koridoroj? La ĉnmigrintoj! Ili kunportas misfortunon al ni kaj nun ni pagas kvazaŭ ni estus la pekantoj! Respondeculoj de la agreso estas ili”.

La silento kiu envolvis la sieĝon fariĝis pli kaj pli peza, eĉ pli peza ol la sieĝo mem. Nek la registaro, nek la ĉefurbestro, nek la deputitoj de la Nacia Asembleo reprezentante la kvartalon esprimis iun ajn kondamnon: la diskutoj pri la stato de la nacio, en kiuj opoziciaj reprezentantoj senbride eligis siajn plej akutajn kritikojn, evitis iun ajn mencion pri la afero. La liberaj radioj, la ĵurnalistoj fakuloj pri “brulaj” temoj, inkluzive la loĝantoj de la apudaj kvartaloj partoprenis tiun intrigon. La filo de la asekurkontrakta vendisto estis renoviginta, neniu scias kiel, siajn televidilajn pilojn kaj li invitis siajn najbarojn plurkanale uzi sian aparaton; ĉevalkuradoj, duonfinaloj de la eŭropa futbala pokalo, lasta moda defilado, disdona ceremonio de la “Oskaroj”, usona serio pri Miajama friponaro, movobildoj, konkursoj, Kvartalo Sesamo (populara porinfana elsendo), rondaj tabloj, “priralecaj

spektakloj”; la agreso de la 2a kvartalo estis nure kaj simple forviŝita.

Laŭ la blondulino de la 5a etaĝo, eksamantino de direktoro de Unesko, la kvartala komitato pri Publika Saneco sendis detalan dosieron al la Ĝenerala Sekretario de la U.N. kaj al la prezidanto de la Internacia tribunalo de Hago pri militaj krimoj kaj pri amasaj malrespektoj de la homaj rajtoj okazintaj en la distrikto sen ricevi iun ajn respondon”.

Eric Collignon



RENASKIĜO DE LA ESPERANTO MOVADO EN BOSNIO

E-KURSOJ EN BOSNIO

Novaj E-kursoj, krom en Sarajevo, okazas tra Bosnio. En Zenica, iam grava metalurgia centro, en Elementa lernejo "Meša Selimović" por dudeko da gelemantoj la kurson gvidas instruisto Jusuf Dizdarević. Ĝi estas la unua postmilita kurso en la urbo kie dum jardekoj tre sukcese aktivis junulara E-klubo.

Sed la kurso en bosnia vilaĝo Bare proksime de fama urbo Gorazde havas apartan intereson. Ĝin por trideko da lernejanoj dum preskaŭ du monatoj gvidis franca instruistino Nicole Rizzoni el Marlaix. S-ino Rizzoni, kiu jam dufoje organizis helpkaravanon por tiu ĉi martira bosnia urbo, decidis resti inter la loĝantaro en vilaĝo Bare kaj inter aliaj aktivecoj organizi E-kurson kun konsento de lerneja direktoro Ramiz Aganović, granda amiko de Esperanto. Antaŭ ol reveni al Francio s-ino Rizzoni donacis propran aŭtomobilon al la Kultur-centro en Gorazde.

KURSOJ

En Sarajevo komenciĝis novaj E-kursoj en elementaj lernejoj. En lernejo "Osman Nakaš" la kurson gvidas gimnaziano Dženita Zvirac, en lernejo "Meša Selimović" juna inĝeniero Samir Ribić, en lernejo "Safvet-beg Bašagić" profesorino Nimeta Kulenović kaj en lernejo "Osman Nuri Hadžić" inĝeniero Fetah Zvirac. Krome, por 15 partoprenintoj de pasintjaraj kursoj ekonomikistino Azra Čolić gvidas superan kurson. Interesiĝo pri instruado de Esperanto en lernejoj tre kreskis post la milito. Radio-Sarajevo invitis E-Ligon de Bosnio-Hercegovino prepari sesmonatan kurson por eduka programo. Tamen, pro detruita havaĵo, draste mankas lernolibroj, vortaroj kaj alia instrumaterialo.

UNUAJ KURSOJ EN SARAJEVO

Preskaŭ mirakle en la detruita Sarajevo okazis la unuaj postmilitaj E-kursoj. Ekde marto ĉi-jare en Elementaj lernejoj "Osman Nakaš" kaj "Osman Nuri Hadžić" komenciĝis kursoj por 30, respektive 10 lernejanoj kadre de liberaj aktivecoj. La kursoj ne povis akcepti ĉiujn intereseulojn, ĉar grava limigo estis adekvataj lernoĉambroj (en lernejo "Osman Nuri Hadžić" la instruado ankoraŭ okazas en keloj de ĉirkaŭaj domoj) kaj manko de instruistoj. La unuajn postmilitajn kursojn gvidis Azra okazinta Čolić kaj Fetah Zvirac, elstaraj aktivuloj de E-Ligo de Bosnio-Hercegovino.

ESPERANTISTAJ OBSERVANTOJ DUM LA BALOTADO

La bosniaj balotoj okazintaj la 14-an de septembro 1996 altiris grandan mondan atenton, ĉar interalie ilin organizis Organizo por Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo. Inter 1200 internaciaj observantoj troviĝis almenaŭ du E-parolantoj. D-ro Wim de Smet el Belgio deĵoris en Sarajevo kaj s-ro Sergej Pevertajlo el Uzbekio en Zenica. Kvankam la Oficejo de OSKE ne konsentis pri aparta kunveno de E-parolantaj observantoj kiun proponis E-Ligo de BkH, s-roj de Smet kaj Pevertajlo havis plurajn utilajn kontaktojn kun lokaj esperantistoj.

UNUA ĈEFKUNVENO DE E.L.B.H.

E-Ligo de Bosnio-Hercegovino okazigis la 22an de junio de 1996 la unuan regulan postmilitan Ĉefkunvenon. La kunsidon partoprenis trideko da membroj el Sarajevo kaj Zenica. La Ĉefkunveno pritraktis raporton pri laboro de la asocio dum milita stato (1992-1996), finigis mandaton de militaj organoj de la Ligo kaj elektis novan estraron. Krome, ia Ĉefkunveno alprenis tre seriozan programon pri rekonstruo de la E-movado en Bosnio-Hercegovino post la kvarjara milito kaj senskrupula agreso kontraŭ tiu ĉi ŝtato.

“ESPERO” EFIKE AGAS

“Tiu-ĉi milito estas unavice la milito kontraŭ civiluloj”, deklaris alta funkciulo de Internacia Ruĝa Kruco komence de la agreso kontraŭ Bosnio. Por helpi milionojn da ordinaraj homoj ekde la unuaj militaj tagoj ekaktivis multegaj humanitaraj organizoj klopodante liveri bazajn nutraĵojn, medikamentojn, vestaĵojn, mesaĝojn kaj plurajn aliajn vivbezonaĵojn.

En la blokita kaj sieĝata Sarajevo esperantistoj fondis ankaŭ sian Humanitaran Organizon “ESPERO” kiu plenumis multegajn servojn por sia membraro kaj por multaj aliaj civitanoj.

Nun ESPERO estas oficiale registrita laŭ nova leĝo por humanitaraj organizaĵoj en Bosnio kaj Hercegovino. La ĉefkunveno de E-Ligo de BkH nomis novan estraron, kiun prezidas Fetah Zvirac kaj novan direkcion, sub gvido de Ŝefik Rizvanović. La estraro anoncis novajn seriozajn projektojn nun ekster la kadro de la E-movado. Ĝi ĵus kontraktis partoprenon en rekonstruado de regiona hospitalo en bosnia urbeto Teŝanj kion financos la kataluna komunumo Santa Perpètua de Mogoda kaj Humanitara Oficejo de Eŭropa Komisiono (ECHO)

INTERŜANĜO NOVIGRAD ST.NAZAIRE

Inter la 5-a kaj la 20-a de oktobro 1996 realiĝis ambicia projekto pri vizito de sarajevaj lernejoj el Komunumo Novi Grad al la franca urbo Saint Nazaire. La projekton sukcesigis la Komitato “Sarajevo-Saint-Nazaire” en kiu tre aktive kunlaboris Esperantistoj de la du urboj. En sarajeva delegacio, kiu konsistis el 32 lernejoj kaj 5 plenkreskuloj, troviĝis du esperantistaj infanoj kaj s-ro Mustafa Resulović, estraro de ELBH. Dum la restado en Saint Nazaire ili kunvenis kun la lokaj esperantistoj kaj estis ege amike akceptitaj en iliaj domoj. La tuta projekto realiĝis fakte dank al efika uzo de Esperanto en korespondado kaj rilatado inter la du urboj kiujn ligas iom simila tragika milita historio.

PROPONO PRI NOVA PIV-a TERMINO

Bosn/o -ano de ĉefgento loĝanta en ujo; la a lingvo (sudslava parenca al la kroata kaj serba lingvoj skribata per latina kaj cirila skriboj); la Eklezio ia, io, ujo 1. Ŝtato en meza parto de Balkana duoninsulo (Sarajevo 18°25'E 43°51'N) limigita de Serbujo (laŭlonge de rivero Drina), Montenegro (en orienta Hercegovino) kaj Kroatujo (laŭlonge de rivero Sava kaj de Dalmatio) 2. Mezepoka reĝlando, Otomana pašalando, aŭstro-hungara provinco, eksa jugoslavia respubliko.

RADIO B.H.

Sekve de favora sinteno de la programkonsilio kaj amasa reago de aŭskultantoj - esperantistoj Radio Bosnio-Hercegovino invitis la E-ligo de BkH ekde la 1-a de julio 1996, post sesmonata paŭzo, daŭrigi elsendadon de la programo “Esperanto el Sarajevo”.

SKIZO PRI HISTORIO DE BOSNIO

de Šefik Rizvanović

Kun enmigrado de slavaj gentoj komence de la 7-a jc., komenciĝas nova, sudslava periodo de historio de tiu ĉi regiono. De tiam kaj ĝis la fino de la 11-a jc. kun certeco oni povas aserti ke Bosnio fariĝis teritoria kaj politika organismo kun relative organizita aŭtoritato kies portanto nomiĝis banuso. La unua konata nomo de bosnia banuso estis Boriĉ (1154-1163), kaj la unua mencio de bosnia episkopejo establita por banusejo Bosnio datas el 1089.

Dum banuso Kulin (1180-1204), la heredinto de Boriĉ, Bosnio spertas kulturen kaj ekonomian progreson. Eĉ hodiaŭ en la popolo estas sentencoj rilataj al la "bonaj temp(us)oj dum Kulinbanuso". Estas konservita ĉarto de banuso Kulin el 1189 skribita en la bosna lingvo en originala bosna alfabeto (nomata bosnaskribo). Temas fakte pri kontrakto pri reguligo de komercaj rilatoj inter Bosnio kaj la civito Dubrovniko, kio estis siaspeca gesto de la reganto kaj pruvo de lia povo kaj organizo de lia ŝtato.

Kulmino de la reĝlando Bosnio

Sian ascendon Bosnio ĝisvivis dum banuso Stjepan la 2-a Kotromaniĉ (1322-1353). Ĝi disvastiĝis de rivero Sava ĝis la marbordo kaj de rivero Cetina ĝis rivero Drina. En Bosnio oni ekforĝis propran monon. Laŭ dokumentoj, la banuso Stjepan la 2-a estis enterigita "...ĉe preĝejo de Sankta Nikolao en Mileŝevo, en Bosnio...".

Tronheredanto de Stjepan la 2-a Tvrtko la 1-a Kotromaniĉ (1353-1391). Dum lia epoko Bosnio ĝisvivis kulminon kaj proklamiĝis reĝlando en 1377. Post la morto de

caro Uroŝ, la lasta serba reganto el dinastio Nemanjiĉ (1371), Tvrtko la 1-a postulis kaj ricevis la serban tronon por si, kaj transprenis titolon ankaŭ de serba reĝo. Post la morto de hungara-kroata reĝo Ludoviko (1382), Tvrtko la 1-a alligis al Bosnio plejparton de malnova kroata teritorio kaj dalmatan marzonon kun insuloj kaj urboj (escepte de Zadar kaj Dubrovnik). La reĝlando Bosnio okupis tiam partojn de la marbordo kun urboj Ŝibenik, Trogir, Split kaj insuloj Ŝolta, Hvar kaj Korĉula (ĉion krom civito Dubrovniko kaj duoninsulo Peljeŝac), krome montenegran ĉemarujojn kun golfo Boka Kotorska kaj postfronto funde norden inkluzive la monaĥejon Mileŝevo en nuntempa Serbio. Kontraŭe al ĉi tio, Bosnio en sia miljara historio neniam estis sub aŭtoritato de kroataj aŭ serbaj regantoj.

Post morto de Tvrtko la 1-a Bosnio forlasis certajn teritoriojn profite de hungar-kroata reĝo.

Bosnio tiam suferis fortan hungaran premon de nordo kaj okcidento kaj jam komencis sentiĝi la premo de turkaj konkeradoj en oriento.

Eklezio bosnia

Kondiĉoj en kiuj evoluis la religio en mezepoka Bosnio -ege interesa fenomeno- estis tre kompleksaj. Enmigrinte la regionon de la nuntempa Bosnio slavo alportis sian paganan religion, sed surloke ankaŭ trovis solidan eklezian organizon. Tiu situacio favoris, ke sub influo de maniĥeismo, respektive dualisma religia koncepto, disvolviĝu aparte *ecclesia bosnensis* (bosnia

Eklezio). Fine de la 11-a jc. Aperis la unuaj akuzoj de papo kontraŭ banuso Kulin, ke li akceptas kaj protektas herezulojn en Bosnio. Ritoj de la bosnia Eklezio plenumiĝis en la popola, bosna lingvo. Antagonismo kontraŭ la latina, kiu estis lingvo de predikoj de la verkredanta katolikismo, restos en la mezepoka Bosnio unu el la decidaj faktoroj por evoluo de lokaj ekleziaj cirkonstancoj.

Adeptoj de la bosnia Eklezio nomis sin *bosnaj kristanoj*. Surbaze de multaj historiaj dokumentoj oni povas rekonstrui elementojn de la religio de bosnia Eklezio. Unu el ili estas ligita kun fama evento de 1203 - publika rezigno je herezo. Kvankam eksponita al fortaj premoj de *verkredantaj* orienta kaj okcidenta eklezioj la dualisma religio de bosnia eklezio dum tri jarcentoj de la mezepoka Bosnio spertis grandan prosperon. Ĉu sur fundamentoj de tiu historia religia konflikto kreiĝis favora grundo por amasa akceptiĝo de nova religio - islamo- en novaj historiaj cirkonstancoj?

Kvarcent jarojn sub Otomana Imperio

En 1463 Bosnio falis sub turkan aŭtoritaton. La lando estis forrabita kaj dezertigita, granda parto de la loĝantaro rifuĝis al najbaraj landoj aŭ estis forkondukita en sklavecon. La lasta bosnia reĝo Stjepan Tomaŝeviĉ estis ekzekutita kaj la reĝino Katarina mortis en papa ekzilio.

Per iom post ioma konkerado de Bosnio otomanoj detruis feŭdan bosnian ŝtaton kaj establis propran soci-politikan sistemon. En 1580 estis fondita bosnia paŝlando en

kies konsiston eniris la teritorio de feŭda Bosnio kaj de otomanoj okupitaj partoj de Dalmatio kaj Slavonio. La Viena milito inter Aŭstrio kaj Turkio finiĝis per

packontrakto en Sremski Karlovci (1699). Tiam estis fiksitaj nordaj, okcidentaj kaj sudaj landlimoj de la bosnia paŝalando. Per sudorienta limo la paŝalando ampleksis

regionon de novpazara sanĝako (provinco nomita laŭ urbo Novi Pazar) eĉ ĝis 1872. Temas pri teritorio de la nuntempa regiono Sanĝak, dividita inter Serbio kaj Montenegro.



Vekiĝo de bosna identeco

Dum la mezepoka otomana regado en Bosnio opaj kategorioj de muzulmana loĝantaro de Bosnio ĝuis certajn privilegiojn. Pro ilia defendo okazis ribeloj jam komence de la 17-a jc. Dumtempe la ribeloj ricevis karakteron de defendo de la bosna memkonscio. Dum unu el grandskalaj ribeloj de vilaĝanoj de sarajeva kadilando (provinco) en la kvina jardeko de la 18-a jc., oni lanĉis agadon pri kreo de certa loka milita organizo kun la celo transpreni defendon de la lando en siajn manojn. En la batalo ĉe Banjaluka kontraŭ aŭstraca en 1737 bosniaj muzulmanoj (aŭtoktone nomataj bosnoj) elbatalis brilan venkon. Ekde tiu momento bosniaj muzulmanoj konstituiĝis kiel nacio. Tiutempe la civila kaj milita aŭtoritato (ajanoj kaj kapitanoj t.e. tribunaloj kaj soldataro) koncentriĝis en manoj de plej prestiĝaj enlandaj bejaj familioj. Reformoj de la sultano Mahmud la 2-a pri abolo de klasikaj institucioj kaj rearanĝo de la ŝtato sur principoj de absoluta monarkio provokis konfliktojn kun bosniaj ajanoj kaj kapitanoj sub gvido de Husein-kapitano Gradaŝĉević.

La politika programo de bosnoj resumiĝis en postulo, ke al Bosnio oni donu aŭtonoman pozicion en la Otomana Imperio kaj ke la bosnian veziron oni elektu el vicoj de la loka nobelaro. La ribelon de Husein-kapitano sange sufokis la sultana armeo en batalo ĉe Sarajevo en 1833. La bosniaj ortodoksuloj kaj katolikoj ekribelis sub premo de impostoj kaj aliaj devigoj. Poste iliaj agadoj havis politikajn postulojn. Instigitaj de oriento kaj okcidento la bosniaj ortodoksuloj kaj katolikoj laŭgrade nacie identiĝis kiel serboj, respektive kroatoj. Tiu ĉi proceso estis precipe organizita kaj agresiva de oriento el Serbio jam ekde la 19-a jc. Celoj de ĉiuj tiurilataj agadoj el Serbio

estis disigi unuecan estajon de la bosna popolo kaj malprofite al ĝi realigi agresemajn revojn pri Granda Serbio.

De aŭstrohungara monarkio tra Jugoslavio ĝis sendependiĝo

En 1878 Bosnio estis okupita de Aŭstrio-Hungario kvankam ĝi restis formale sub sultana aŭtoritato. Aŭstrio-Hungario proklamis en 1908 anekson de Bosnio kaj Hercegovino. En la aneksitaj regionoj komenciĝis politika organizado kun programoj kies ĉefa celo estis liberiĝo el la okupacio. Post atenco al aŭstrohungara tronheredanto Franz Ferdinand en 1914 en Sarajevo, en Bosnio estas enkondukata milita reĝimo.

La disfalon de Aŭstrio-Hungario en 1918 sekvis proklamo de la Reĝlando de serboj, kroatoj kaj slovenoj, en kies konsiston eniris ankaŭ Bosnio kaj Hercegovino surbaze de la decido de antaŭe establita Popola konsilantaro. La reĝlando ŝanĝis la nomon al reĝlando Jugoslavio. En 1939 estis farita koncepto pri nacia reorganizo de la reĝlando surbaze de teritoria divido inter serboj kaj kroatoj, ne konsiderante la dezirojn kaj interesojn de aliaj nacioj kiuj vivis en tiu ŝtato.

Kroataj nacionalistoj baldaŭ kontentigis proprajn interesojn. Komence de la 2-a mondmilito (1941) helpe de faŝismaj Germanio kaj Italio estis proklamita Sendependa ŝtato Kroatio, en kies konsisto troviĝis Bosnio kaj Hercegovino.

Dum la kontraŭfaŝisma milito (1941-1945) de jugoslaviaj popoloj sub gvido de komunistaj partioj plej grandaj bataloj okazis sur la terenoj de Bosnio kaj Hercegovino. En 1942 fondiĝis Kontraŭfaŝisma Konsilantaro de Popola Liberiĝo de

Jugoslavio (AVNOJ) kiel tutpopola kaj ĝeneralpolitika reprezentanto de la naciliberiga movado. Dum ĝia dua sesio en novembro 1943 oni decidis, ke la nova Jugoslavio estu starigita sub federacia principo. Ĝian konsiston eniris Bosnio kaj Hercegovino kiel aparta respubliko, ne kiel nacia ŝtato de unu popolo, sed kiel historia patrujo de bosniaj muzulmanoj, serboj kaj kroatoj kaj de aliaj popoloj kiuj vivas en ĝi.

Post disfalo de socialisma Jugoslavio (1991), surbaze de referendumo kaj esprimita volo de 2/3 da enloĝantoj por sendependiĝo, la Respubliko Bosnio kaj Hercegovino batalis por sia internacia agnosko. La 6-an de aprilo 1992 ĝian suverenecon konfirmis la Eŭropa Komunumo kaj la 21-an de majo ĝi fariĝis membro-ŝtato de Unuiĝintaj Nacioj.

Tiuj faktoj estis rekta motivo de kruela kaj malhumana agreso de serba-montenegra faŝismo kontraŭ Bosnio kaj Hercegovino, subtenata de eksa jugoslavia armeo. Ideologia bazo por tiu akto estas revoj de Granda Serbio, la ŝtato de *ĉiela popolo* purigita de neserbaj enloĝantoj. Tiaj planoj akordas kun la planoj de kroataj nacionalistoj pri disvastigo de teritorioj de Kroatio al teritorioj de Bosnio kaj Hercegovino.

Sed, kiel kutime okazas en historio, agresantoj kaj krimuloj forgesaj certan faktan aŭ neglektas ĝian influon, tiel ke finfine ili ĝisvivis plenan fiaskon. La fakto kiun ĉi-foje la agresantoj neglektis estas la tradicia, en ĉiam videbla bosna popola spirito kiu etendiĝas tra miljara historio de Bosnio. Tiu spirito inspiras hodiaŭajn bosniajn patriotojn kiuj defendas sian patrujon kaj batalas por ĝia liberiĝo kaj paco.

LA REKONSTRUADO DE BOSNIO:


ŜANCO POR MEZGRANDAJ KAJ MALGRANDAJ ENTREPRENOJ

Senad Čolić

Bosnio estis dum la lastaj kvar jaroj viktimo de la plej brutala agreso okazinta kontraŭ iu ajn suverena membro-ŝtato de Unuiĝintaj Nacioj depost la dua mondmilito. Ĝin agresis najbaraj ŝtatoj Serbio kaj Montenegro, poste nomitaj Jugoslavio kaj dum unu jaro ankaŭ Kroatio.

Celo de la agreso estis detruigi ŝtaton Bosnion, likvidi aŭ "purigi" ĝian aŭtohtonan loĝantaron, detruigi kompletan pribosnian materian heredaĵon kaj historian memoron, kulturen kaj spiritan identecon, sufoki ekonomian vivon kaj prirabi kompletan ŝtatan aŭ privatan havaĵon. Tiam ĉionampleksan, totalan, sisteman planon pri malkonstruo ankoraŭ ne notis nia moderna historio. Plej strange estas ke la brutalaĵoj okazis, dank al modernaj komunikiloj, antaŭ okuloj de la tuta mondo, en koro de Eŭropo, je malpli ol unu-hora flugo de nia kunvenejo.

Sed malgraŭ ĉio aŭ spite al ĉio - mirakle - la agreso ne sukcesis. Bosnio transvivis. La agreso postlasis preskaŭ tricentmil mortgitojn, cent mil invalidojn, sennombrajn homajn tragediojn kaj nemezureblajn suferojn, dezertigitan landon kaj materiajn ruinojn kies kvantigeblan valoron oni pritaksas je 200 miliardoj da dolaroj. Post haltigo de la agreso kaj la subskribita pac-kontrakto en Dayton, la t.n. internacia komunumo decidis per diversaj programoj subteni kiel eble plej rapidan socian, moralan kaj ekonomian rekonstruon de Bosnio. La socia rekonstruo devus okazi post baldaŭ okazontaj balotoj, pri la morala zorgas en Hago la Internacia Kortumo de Justico kaj la Internacia Tribunalulo por Militkrimoj en eksa Jugoslavio, kaj por la ekonomia rekonstruo t.n. Bruselaj konferencoj de donacintoj. Por nia hodiaŭa temo la ekonomia aspekto de la rekonstruado de Bosnio kompreneble altiras specialan atenton.



Bazaj informoj pri bosnia ekonomio

Bosnio-Hercegovino, situata en suda Eŭropo, estas samtempe kaj la balkana kaj la mediteranea lando. Ĝi ampleksas 51.129 km², kaj en ĝi en 1991 vivis 4.364.574 loĝantoj aŭ 85 loĝantoj sur la kvadratkilometro. Bosnio disponas gravajn naturajn riĉaĵojn. Ili konsistas el 1.589.000 hektaroj de kultivebla tero, el rezervoj de 3,9 bilionoj da tunoj de mineraloj (karbo, plumbo, zinko, fero, baŭksito, ktp.), el rezervoj de nemetalaj krudaĵoj de 14,5 milionoj da tunoj, el forstoj kiuj kovras 53% de la lando kaj el konsiderinda hidro-potencialo.

Tial en la bosnia ekonomio superregis industrio kaj metio surbaze de kiuj Bosnio troviĝis inter evoluanta kaj mezevoluinta lando. Ĝia ekonomia strukturo estis kompareble branĉigita. Primaraj sektoroj speciale estis produktado de krudaĵoj, baza energio kaj aliaj industriaj branĉoj kiuj ampleksis entute 43% de socia produkto, poste venis agrikulturo kun 10%, komerco kun 17%, konstrutekniko kun 9%, transporto 8% kaj aliaj produktaj aktivecoj kiuj ampleksis 13% de socia produkto. Gravas emfazi ke evoluigo de sekundaraj kaj terciaraj industriaj sektoroj estis instigitaj per apliko de alta teknologio kaj industria kooperado per komuna investado kun kompanioj el evoluantaj landoj.

Socia produkto en 1991 estis 7,979.000.000 da usonaj dolaroj aŭ 1.855 USD pokape de loĝanto. Industria produktado sumis 4,540 miliardoj da dolaroj, eksporto 2,187 miliardoj USD kaj importado 1,734 miliardoj USD. Postenis 945.921 laboristoj, el kiuj en ekonomia sektoro laboris 797.549 kaj en neekonomiaj sektoroj 148.372 personoj.

La kvar-jara milito havis por bosnia ekonomio katastrofajn sekvojn. Industria produktado preskaŭ komplete haltiĝis, multegajn instalaĵojn oni plurfoje bombardis, tre multajn prirabis aŭ simple detruis. Fervoja trafiko komplete ĉesis funkcii, kaj la ŝosea funkciis kun grandaj malfacilaĵoj pro ege multaj fermitaj vojoj sekve de militaj aktivecoj. Laŭ ekspertoj de bosnia Ekonomia Ĉambro la militan damaĝon oni povus pritaksi jene: perdoj en socia produkto de 30 miliardoj USD, perdoj en eksporto 10 miliardoj USD, investaj perdoj 8 miliardoj USD, rektaj ekonomiaj damaĝoj pro detruitaj kapacitoj, stokejoj kaj infrastrukturo kelkdekoj da miliardoj USD, perdoj pro malkonstruita mon-sistemo kaj de aliaj segmentoj de ekonomia sistemo 3 miliardoj, perdoj de publikaj fondaĵoj (edukado, sanzorgado pensioj, ktp.) 8 miliardoj USD. Al tio necesas aldoni pezajn damaĝojn de ĉirkaŭ 50% de atkvalifikitaj, altlernejaj fakuloj.

Pro ĉio socia produkto en 1994 sumis nur 1,112 miliardojn USD, eksporto notis nur 14 kaj importado 494 milionojn USD.

La antaŭmilita kaj milita epokoj signis krome ŝanĝon de sociekonomia sistemo de la lando. La kadukiĝintan t.n. socialisman memmastran ekonomion komencis anstataŭi merkata ekonomio kaj sistemo de kapitalisma produktado. Bosnio ankoraŭ pro milito ne frontis larĝskale transformiĝon de ekonomia sistemo. Tuj post balotoj komenciĝis granda proceso de privatigo de ekonomio kaj transigo de kapitalo el ŝtataj en diversformajn privatajn entreprenojn. Tial la anoncitaj rekonstruaj programoj kaj la antaŭvidebla ŝanĝo de ekonomia strukturo kreas tre favoran etoson por ekonomia iniciato en Bosnio kaj Hercegovino

Internacia helpo por la rekonstruo

La dezertigita lando por ekonomia rekonstruo unue bezonas freŝan kapitalon. Ĝin decidis disponigi internacia komunumo sub egido de Eŭropa Unio. Ĝi kunvokis en Bruselo du konferencojn de donacintoj kiuj rezultis ke jam 45 ŝtatoj indikis propran partoprenon en la rekonstrua programo plus gvidaj financaj institucioj de la mondo kiel la Monda Banko por renovigo kaj evoluigo, la Eŭropa Banko por renovigo kaj evoluigo, la Islama Banko kaj pluraj aliaj privataj fondaĵoj. Ĝis nun en la Bruselaj konferencoj oni kolektis 1,909 miliardojn USD. Por nun plej multe donacos Eŭropa Unio 358 milionojn USD, la Monda Banko 333 milionojn, Usono 280 milionojn, Japanio 130 milionojn, la Eŭropa Banko 100 milionojn, Nederlando 101 milionojn, Italio 67 milionojn, Irano 50 milionojn USD kaj tiel plu.

El la ĝis nun kolektita sumo 67% estas mondonacoj, 7% var-donacoj, 21% favoraj kreditoj kaj nur 5% komercaj kreditoj.

La donacintoj indikis ankaŭ ekonomiajn sektorojn en kiuj ili prioritare subtenos la rekonstruon. Temas pri la jenaj sektoroj: domkonstruado, akvoviverado, energio, industrio, agrikulturo, transporto, sanzorgado, socialaj servoj, edukado, telekomunikiloj, ŝtata administracio, humanitaraj programoj kaj malminigo de la tereno.

La registaro de Italio en la Bruselaj konferencoj anoncis donacojn en valoro de 67,4 milionojn USD por subteni projektojn en industrio, akvoviverado, telekomunikiloj, transporto, sanzorgado, energio, domkonstruado, malminigo kaj socialaj servoj.

Ĉiuj donacoj kaj kreditoj realiĝos tra internaciaj financaj institucioj kaj komercaj bankoj.

ROLO DE MALGRANDAJ ENTREPRENOJ

Celoj de la rekonstrua programo estas subteni per freŝa kapitalo ekulon de normala ekonomia vivo, formiĝon de nova propieta strukturo kaj inkluzivigon de bosnia ekonomio en eŭropajn kaj mondajn evolutendencojn. Por viviĝi bosnian ekonomion - laŭ asertoj de ekspertoj - la plej gravan rolon havos ĝuste malgrandaj kaj mezgrandaj entreprenoj. En siaj ekonomiaj branĉoj ili devas trovi adekvatajn partnerojn kun kiuj ili povos plej efike realigi komunajn projektojn.

En produktado de nutraĵo, agrikulturo, komerco bosnia ekonomio per propraj fortoj ankoraŭ longe ne povos ŝtopi la breĉon. Investoj en tiuj sektoroj, precipe pro jama formiĝo de pluraj privataj entreprenoj, ŝajnas tre allogaj. En industrio tre baldaŭ post transiĝo de proprio la investoj estos ankoraŭ pli interesaj. Bosnio disponas altkvalitan teknikan personaron, fakajn laboristojn, spertajn negocistojn kaj alian tre kvalifikitan personaron en ĉiuj ekonomiaj branĉoj kiuj estas antaŭkondiĉo kaj garantio por rapida integriĝo de iliaj scioj kaj spertoj en novaj kondiĉoj. En intensiĝanta ekonomia vivo rapida moviĝemo, adaptiĝemo kaj flekseblo de malgrandaj kaj mezgrandaj entreprenoj ŝajnas plej oportuna formo por bosnia situacio.


Tradiciaj partneroj de bosniaj entreprenoj antaŭmilite troviĝis en eŭropaj landoj, en eks-socialismaj landoj kaj en evolulandoj el kiuj islamaj landoj okupis elstaran lokon. Eĉ dum la milito bosniaj firmaoj laboris en Alĝerio, Libio, Malajzio, Pakistano, Kuvajto. Estas atendeble ke en tiu landaro kaj en pluraj aliaj okcidenteŭropaj,

orienteŭropaj, afrikaj kaj aziaj landoj firmiĝos pozicioj de bosniaj entreprenoj kaj tiel malfermiĝos novaj eblecoj por iliaj partneroj.

Por negoca komunikado sur la monda merkato lingva problemo estas serioza baro. En Bosnio oni parolas la bosnan lingvon. Tra lerneja sistemo ĝis la milito oni instruis la anglan (ĉ. 40%), la rusan (30%), la germanan (20%) kaj la francan (10%). Pri instruado de fremdaj lingvoj la registaro ankoraŭ ne alprenis decidon. Tamen eblas atendi sur teritorio de Federacio ke plilarĝiĝos instruado de la angla, stabiĝos la germana, kaj verŝajne malaperos la rusa kaj la franca. Pligraviĝos eble la araba, dum ekinstruo de la hispana kaj la itala lingvoj ne estas atendebla.

Ĉi - rilate oni ne neglektu unu gravan faktoron. Pro tragikaj cirkonstancoj kaj rifuĝo al centoj da landoj bosnianoj estas momente eble la plej poliglota popolo en la mondo. En la akceptitaj landoj ili lernis lokajn lingvojn kio povos montriĝi ege grava por rapida komunika interligiĝo de tiulandaj entreprenistoj kun bosnia merkato. Por serioza negoco oni devas uzi multekostajn servojn de tradukistoj, intense lerni difinitan lokan lingvon aŭ serĉi helpon en modesta kono de la angla. Tiurilate la Internacia Lingvo Esperanto trudiĝas kiel efika alternativo.

Prelego en la 65a Itala Kongreso de Esperanto, Ferrara 24-30.08.96



Restaĵoj de iam impona du-bloka po dek-etaĝa moderna konstruaĵo de eldonejo kaj tagĵurnalo "Oslobodjenje" - el ĝiaj ruinoj kaj keloj malgraŭ ĉio ĉiutage aperis gazeto en la sieĝata Sarajevo

KIAL?

Jes, demandu kial?

Kial,

senkulpaj homoj
senkulpaj infanoj
senkulpaj samideanoj
devas morti ĉiutage
ĉie sur la tero

Demandu kial ...

redemandu kial

En la demando estas la respondo

En la demandvorto estas la
respondvorto

Jes... en Esperanto

Kial enhavas la vorton ial
ial estas parto de kial

Ial ial iuj kiuj kredas

ke homoj povas ami
unu la alian

iuj kiuj kredas ke
la barieroj povas fali

iuj kiuj kredas
ke ni ĉiuj estas anoj de
unu granda rondo familia

Ial...

amikoj mortpafas
amikojn

amikojn mortpafas amikoj
studentoj mortpafas
instruistojn
studentojn mortpafas
instruistoj
disĉiploj mortpafas
gvidantojn
disĉiplojn mortpafas
gvidantojn

KIU?

Jes, demandu Kiu?

Kiu,

Kiu provizas la
mortpafilojn?
la kuglojn?

KIAL?

la municion?

Kiu?

Kiu provizas la
malamikecon?
la malfidelecon?
la malverecon?

Kiuj?

Kiuj respondecas?
Kiuj kulpas?
Kiuj gajnas?

Kial ? Kiu ? Kiuj ? Ĉu gravas ?

KIEL?

Jes, demandu kiel?

Kiel,

“oni” haltigos la
frenezecon?
Kiel “oni” reenamikigos
la popolon?
Kiel “oni” kio?

KIO?

Jes, demandu kio?

Kion

“oni” povas fari?
Kion “oni” devas fari?
Kion “oni” volas fari?

KIOM?

Jes, demandu kiom?

Kiom

da personoj devas morti?
Kiom da personoj devas
suferi?
Kiom da pacbatalantoj la
mondo bezonas?

Samideanoj tenas la fidon:

samideanoj en Zagreb
samideanoj en Sarajevo
samideanoj en San
Francisco

Gravas ke ni kompatu
ke ni pripensu
ke ni konsentu
ke ni est u unu familia rondo

Viaj doloroj estas niaj.
Ĉu vere? Ĉu ni eblas
kompreni?

El niaj sendaĝeraj domoj
rigardante televidilon
El niaj klasĉambroj
studante por la estonteco
El niaj domoj
vartante la familion


Ĉu ni vere povas helpi?
Ni volas kompreni
kompreneti
Ni volas kunsentemi
kunsentemeti
Ni volas kunakordi
kunakordeti

Ĉu helpas? Ĉu subtenas? Ĉu
esperigas?


Akordo urĝas - tutmonde
Batalaj haltoj urĝas
tutmonde
Kuniĝo urĝas - tutmonde

**FRENEZE ! MALAMIKE !
KURAĜE ! SAMIDEANE !
ESPERPLENE !
ZAMENHOF-FIDE !**

**DORI VALLON
WHEELER**



Dum la milito estas detruitaj pli ol 1000 islamaj religiaj objektoj: restaĵoj de la bombardita moskeo "Magribija", centro de Sarajevo.



La nacia kaj universitata biblioteko de Bosnio (iama urbodomo), forbruligita la 2-an de majo 1992 kun pli ol tri milionoj da libroj; iaspeca simbolo de kultura kaj scienca identeco de Bosnio kiujn oni klopdis senskrupule nenigi.

La ĉefpoŝtejo de Sarajevo, konstruita en 1913, bruligita la 2-an de majo 1992 - pli ol duono de sarajevaj telefonoj tiam silentiĝis



Solena malfermo de ekspozicio pri la vivo de T. Sekeljen Sub ta tra muzeo en Poprad (legu sur la p.16)

Redakcio de

Esperantisto Slovaka

Stano Marček, Zvolenská 15

036 01 Martin, Slovakio

Tel. kaj Fakso: +42/(0)842/371 45



Al:

.....

.....

.....

.....

NOVINOVÁ ZÁSIELKA

Podávanie novinových zásielok povolené
OZ SsRP B.Bystrica č.j. 2115/93 PTP 30.6.1993